# La Esperantisto.

Zeitschrift für die Freunde der Esperantosprache. | Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.

Eldonata unu fojon en la monato de L. Zamenhof.

Kosto por ½ jaro (kune kun poŝta transsendo) 2 markoj 30 pfenigoj. (Por Rusujo — 1 rublo, por ĉiuj ceteraj landoj — 3 frankoj.) Anstataŭ mono oni povas sendi signojn de poŝto (de ĉia lando), sed en tia okazo oni devas sendi per 20% pli multe ol la kosto nominala. Anoncoj po 1 marko por 1/32 de la paĝo.

☛ **Ĉio tuŝanta la gazeton „La Esperantisto“ (kiel ekzemple leteroj, artikoloj, pago por la abonado k. c.) devas esti sendata al L. Zamenhof. (Adreso: Dr. L. Samenhof à Varsovie, Russie).**

Oni povas aboni ankaŭ en la librejo de **Heerdegen-Barbeck** en **Nurnbergo.**

**No. 8.** Nurnbergo, Aŭgusto 1891. **Jaro II.**


## De la redakcio.

Forte okupataj je la ellaborado kaj relaborado de la projekto de la Akcia Societo, ni devis malfrui kun la nuna numero de nia gazeto. La numero 9a eliros kiel eble plej baldaŭ.

La projekton pri la Esperantistoj vastigantoj la plej granda parto de niaj legantoj trovis nepraktika, kaj tial la projekto nun estas tute forĵetata. Sed en la nuna numero la legantoj trovos alian, multe pli praktikan kaj realan, projekton por fortigi kaj tute sendanĝerigi la estontecon de nia afero, kaj por tiu ĉi projekto ni petas la plej profundan atenton kaj la plej vivan partoprenon de niaj amikoj. La unuan penson al tiu ĉi projekto donis ankoraŭ antaŭ 2 jaroj sinjoro I. Lojko; en la lasta tempo similan projekton levis sinjoro A. Grabowski. Sed la projektoj de la diritaj amikoj estis fonditaj sur alportado de oferoj, kaj tial ni elvenis kun nia projekto ne pli frue, ol kiam prosperis al ni doni al ĝi karakteron realan, t. e. karakteron komercan kun gajnoj proporcie rekompencantaj la riskon kaj la prunton; ĉar la sperto bedaŭrinde montris al ni, ke per oferoj ni ne malproksime venos: la tuta pezo de perdoj materialaj kaj laboroj ĉiam kuŝus sur la ŝultroj de unu aŭ kelkaj personoj, ĝis ĝi ilin tute dispremus, kaj ĉiuj ceteraj sin kontentigus nur per rigardado. Se ian gravan aferon volas fari unu sola homo sen rimedoj, li pereigas sin mem kaj la celon ne atingas, se li eĉ volas oferi por la afero ĉion, kion li povas; sed se tiun saman aferon prenas en siajn manojn *societo* kun sufiĉa komuna *kapitalo*, tiam la afero atingas sian celon tre bone kaj la societanoj mem ne sole ne faras oferojn kaj ne perdas, sed la mono, kiun ili *prunte donas* al la afero, alportas al ili bonan materialan profiton.

---

## Akcia Societo Esperantista.

En la tago, en kiu mi skribas la nunan artikolon, finiĝas ĝuste 4 jaroj de la momento, kiam la unua broŝuro pri nia lingvo eliris el la muroj de la presejo. De tiu tago pasis 4 jaroj, — jaroj malfacilaj, sed ne senfruktaj. La konfuzo kaj nebuleco de la unua tempo pasis, kaj nun ni povas jam per pli klaraj okuloj ĉirkaŭrigardi nian aferon kaj ĝian estontecon. Ĉiu, kiu bone konas nian lingvon kaj ĝian historion, nun ne dubas, ke per si mem ĝi havas tute certan estontecon. Kvankam per vortoj multaj ankoraŭ batalas kontraŭ nia lingvo kaj afero (el timo, ke oni ne nomu ilin fantaziuloj aŭ ke ni ne riproĉu ilin, kial ili ne subtenas nian aferon), sed en la animo la plej granda parto eĉ de tiuj ĉi niaj ŝajnaj kontraŭuloj — se ili nur efektive konas nian lingvon — aprobas nian aferon kaj deziras, ke ĝi venu al la celo. Kiel ajn ili ŝajnas indiferentaj aŭ kiel ajn ili per vortoj ridas aŭ insultas nian aferon — la *efektiva kaŭzo*, kial ili ne aliĝas al ni, estas tio, ke ili timas, ke ni *ne eltenos*, ke ni baldaŭ *falos*. La plej granda parto de la mondo estas tro „saĝa“, por publike subteni aferon, antaŭ ol ĝia sorto estas decidita; ili pli bone volas atendi kaj vidi, kiel la afero finiĝos: se ni per nia konstanteco venkos, ili aliĝos al ni en grandaj amasoj, venos uzi la pretajn fruktojn kaj post nia morto ili konstruos al ni monumentojn; se nia afero laciĝinte falos — ili ridos nin kaj diros, ke ili en sia saĝeco ĉiam estis kontraŭ nia afero. Vane kelkaj amikoj atendas, ke la riĉuloj aŭ la gravaj personoj kaj societoj aŭ registaroj al ni helpu, kaj vane ili pensas, ke la prospero de nia afero dependas de la helpo de tiuj; ne, kontraŭe, la *helpo de tiuj dependas de la prospero de nia afero*, tion ĉi ni ne devas forgesi, kaj tial ni ne devas sidi senlabore kaj atendi helpon de la potenculoj. La potencaj personoj kaj la registaroj en la animo eble jam longe estas por nia afero, sed ili neniam kaj neniel volos „kompromiti“ sin publike per aliĝo al afero, kies sorto ne estas ankoraŭ decidita kaj kiu „eble apartenas ankoraŭ al la regno de revoj“. Se ni de ili atendos helpon, tiam ni neniam venos al la celo; sed se dank' al nia konstanteco kaj laborado nia afero iom post iom fortiĝados, se la nombro de niaj amikoj senĉese kaj regule grandiĝados, se post kelka tempo oni vidos, ke nia lingvo havas jam grandan nombron da uzantoj, grandan literaturon kaj tute certigitan, jam neŝanceleblan kaj sensubtenan regulan iradon antaŭen, t. e. ke nia afero iom post iom fariĝis jam „fait accompli“ (fakto plenumita), tiam la registaroj kaj la mondo kun ĝojo rapidege aliĝos al ni, unu ekzemplo tuj sekvigos la alian, kaj kun fulma rapideco nia afero venkos la mondon. La glacio longan tempon kontraŭstaras al ĉiuj penoj de la printempa suno; sed kiam dank' al la konstanteco de la sunaj radioj la fluidiĝo fine komenciĝas, tiam la *tuta glacio* rapidege fluidiĝas en *kelkaj tagoj*.

Se ni volas, ke nia afero pli aŭ malpli frue atingu sian celon, ni ne devas atendi iajn grandajn flankajn helpojn, ni ne devas fari iajn kaprompajn saltojn, — la sola afero, kiun ni devas fari, estas: *certigi al nia afero regulan senhaltan iradon antaŭen*, ne peni fari tro multe per unu fojo, iri malpli rapide, sed *regule*, kaj antaŭ ĉio por eterne fojo, iri malpli rapide ... sendanĝerigi nian aferon de ĉia ebla falo aŭ *halto*. Ni devas uzi niajn fortojn ekonomie kaj saĝe. Se ni per unu fojo volas hele brili, tiam ni baldaŭ laciĝos kaj ni ne sole

ne havos la fortojn iri antaŭen, sed la silento post la bruo kaj la mallumo post la lumego estos ankoraŭ tiom pli falanta en la okulojn kaj mortiga por nia afero. Nia afero tiam subite rapidege falos, kiel globo ruliĝanta de altaĵo, kaj ĉio, kion ni kun tiom da peno faris, estos perdita je eterne. Sed se ni kreos por nia afero ian, kvankam ne riĉan, sed konstantan fonton, kiu, ĉiam freŝe kaj egalforte, neniam sekiĝante, donos al ni la eblon sendekliniĝe resti eterne sub nia standardo, sen financaj malhelpoj regule ĉiam eldonadi nian centran gazeton kaj fondi aliajn gazetojn, regule eldonadi ĉiumonate kelkan novan nombron da verkoj kaj per tia maniero senhalte kaj regule grandigadi nian literaturon kaj tiel plu — tiam nia afero baldaŭ fariĝos fakto plenumita, la mondo konvinkiĝos, ke nia afero estas potenca forto, kiu ĉiam kreskas kaj jam absolute neniam devas timi ian falon, kaj la „saĝa" publiko, la potenculoj kaj registaroj, kiuj nun montras al ni ankoraŭ indiferentecon kaj eĉ malamikecon el timo de fiasko, tiam baldaŭ kun danko aliĝos al ni en grandegaj amasoj kaj eterne nin dankos por nia fakto plenumita. Kiam tia forto estos kreita, tiam ni povos esti tute trankvilaj pro la estonteco de nia afero, tiam ni ne devos jam eterne timi, eterne zorgi, perdi la kuraĝon ĉe ĉiu malsukceso, ĉe ĉiu nova montro de la indiferenteco de la publiko ektimi, ke ĉiuj niaj laboroj estas perditaj. Se la publiko eĉ longan tempon ankoraŭ montros al ni sian indiferentecon, tio ĉi nin ne maltrankviligos, ni laborados trankvile kun la plej bonaj esperoj; ni ne devos eterne memorigadi kaj tedadi al niaj amikoj pri helpo kaj subteno, ni ne devos por la vastigado de nia afero elpensadi diversajn strangajn, maloportunajn kaj danĝerajn rimedojn; kaj kiel ajn malrapide nia afero eĉ irus en la unua tempo, ni ĉiam povos esti tute certaj je nia venko. Ĉar se eĉ la plej granda unufoja akvego ofte transiras tute sen postesignoj, konstante falanta guto truas eĉ ŝtonon. Nian laboron kaj materialajn rimedojn, kiujn ni ĝis nun uzadis senplane kaj distrite, ni devas nun reguligi, centrigi kaj ekonomiigi. Antaŭ ol ni zorgas pri grandaj akvoj, ni devas uzi la tutan nian forton por krei almenaŭ guton, sed konstantan, senhaltan. Nur kiam tia guto estos kreita kaj certigita, ni iros pli malproksime kaj penos el la konstanta, senhalta guto fari iom post iom konstantan, senhaltan akvegon.

Kiel krei tian konstantan fonton, kaj kiu ĝi devas esti?

Antaŭ ol ni respondas tiun ĉi demandon, ni devas fari la sekvantan rimarkon. La tuta laborado en nia afero ne estas ia komplikita, sed konsistas en jeno: eldonadi, konstante kaj regule eldonadi verkojn, gazetojn, krei grandan, ĉiam kreskantan literaturon, kio ne sole perfektigos nian lingvon, sed elvokos respekton por nia afero multe pli, ol ĉia alia agado, kaj per la forto de sia vivado kaj kreskado aligos al nia afero la tutan mondon pli rapide kaj pli certe, ol ĉiuj plej energiaj teoriaj predikadoj kaj plej rafinitaj agitadoj; ĉar la mondo estimas nur la faktojn. Ni havas laborantojn, sed mankas al ili la rimedoj. Se eĉ mankus al ni laborantoj, ni povus per mono facile ilin krei. Sekve la konstanta fonto, kiun ni bezonas krei, devas esti pure financa. Se ni tian fonton havos, ni havos ĉion. Sekve la tuta demando „kiel certigi la estontecon de nia afero" oni povas anstataŭigi per alia pli simpla demando: kian „konstantan ĉiujaran sumon da mono ni devas havi, por ke la estonteco de nia afero estu tute ekster danĝero?" Nun ni rigardu la miniman sumon, kiu ĉiujare estas al ni necesa por tiu ĉi celo.

Antaŭ ĉio ni devas plene certigi la estontecon kaj la senhaltan regulan eliradon de nia centra gazeto. Ĝi estas la unuiganto, la pelanto kaj la regulatoro de nia afero, per unu vorto — ĝi estas la koro de nia afero. Tie ni devas antaŭ ĉio centri nian tutan forton, ni ne devas uzi flanke eĉ la plej malgrandan el niaj fortoj kaj rimedoj materialaj, antaŭ ol ni estas tute certaj, ke la daŭrado de nia centra organo staras tute ekster danĝero. Se unu fojon tiu ĉi koro devos halti, tiam perdiĝos nia tuta afero kaj ĝin ne povos savi la plej grandaj sensistemе disĵetataj oferoj, kiuj povas doni nur minutan lumon. Ni prezentu al ni ekzemple, ke ni en la momento havas riĉajn rimedojn kaj uzas ilin por dissendi en la mondon grandegan nombron da lernolibroj, aŭ en ia alia pasanta maniero, kaj post kelka tempo montriĝas, ke pro ia neantaŭpensita eraro de nia flanko nia faro restas sen fruktoj, aŭ ni devas longe atendi la maturiĝon de la fruktoj, kaj dume ni restas sen rimedoj kaj lacaj kaj devas el manko de fortoj ĉesigi la eliradon de nia organo . . . . . kio tiam estos? Ĉio, kion ni faris kaj oferis, estos per unu fojo perdita je eterne! Neniu jam volos pensi iam helpi al relevo de afero falinta, kaj eĉ plej grandaj oferoj jam ne povos relevi en la okuloj de la mondo aferon unu fojon falintan, se Vi eĉ mil fojojn ripetados al la mondo, ke la afero siatempe falis nur el manko de materialaj rimedoj. Sed se ni scios, ke la vivo de nia organo estas por eterne, aŭ almenaŭ por tre longa tempo, tute certigita, tiam ni pro la estonteco de nia afero jam povos esti tute trankvilaj eĉ tiam, se ni estos tiel malfortaj, ke ni ekster la organo en la daŭro de kelka tempo povos nenion alian fari por nia afero. Nun estas por ni la plej malfacila tempo: la nun tro videbla falo de Volapük, kiu siatempe arte elvokis grandan bruon, por kelka tempo tute malvarmigis la mondon por la ideo de lingvo internacia (ĉar la mondo ne scias la veran kaŭzon de tiu falo kaj, miksante la Volapükon kun la Esperanto, diras, ke „la ideo de lingvo internacia" falis, kaj la mondo ne volas nun eĉ aŭdi pri ia lingvo internacia); sed pasos kelka tempo, kaj baldaŭ la animoj trankviliĝos, la konfuzo, farita de la Volapük, estos forgesita, la sankta ideo, elteninte viva kaj sana la malfacilan tempon, denove resonos en la koroj de la homoj (ĉar en la homaj koroj preteriranta vento povas nur por kelka tempo pasante malvarmigi, sed neniam tute estingi la sopiron je la idealo, se nur la idealo mem sin tenas), — kaj nia afero havos antaŭ si larĝan, liberan, brilantan vojon. Sed por travivi tiujn ĉi malfacilajn kelkajn jarojn, estas al ni antaŭ ĉio necesa la regula vivado de nia organo, kiu devas teni nian aferon, pacience stari kaj batali, ĝis la malfacila tempo pasos, kaj tiam — la estonteco estas nia por eterne! Ĉu ni ekster nia organo povos multe fari por nia afero aŭ en la daŭro de kelka tempo povos fari nur tre malmulte, — kun la vivo de nia organo estas ligita la vivo de nia afero. Nia organo estas la trunko de nia afero: tiel longe kiel la trunko vivas, ni devas timi nenian vintron, se ĝi eĉ glaciiĝos la branĉojn kaj la foliojn, kaj kun la plej bonaj esperoj ni povas atendi la printempon; sed se la trunko ĉesos vivi, — ĉiuj esperoj estas perditaj. Tial ni per ĉiuj fortoj turnas la atenton de niaj amikoj sur nian gazeton. Se ni volas sisteme konduki nian aferon, ni devas antaŭ ĉio tute certigi kaj sendanĝerigi la ekzistadon de nia gazeto. Nenian paŝon plu, antaŭ ol la plej grava estas farita!

Sed ni rigardu, en kiaj kondiĉoj de vivo sin trovas nia organo. La sola presado de nia gazeto kostas ĉirkaŭ 500 rublojn ĉiujare. La enspezo de la abona mono kovras apenaŭ duonon de la el spezoj. Tiel longe kiel la skribanto de tiu ĉi artikolo havis ankoraŭ propran kapitalon, li nenion domaĝis kaj metis en la aferon ĉion, kion li havis. Dank' al la grandaj elspezoj, kiujn la eldonado de verkoj kaj la propagando englutis, precipe en la unua tempo, kiam nia afero estis ankoraŭ tute kruda kaj ĉiu paŝo kostis grandegajn oferojn, la monujo baldaŭ montris al li sian nudan fundon. Ne esperante trovi ian subtenon de la flanko de niaj amikoj kaj ne volante tamen lasi fali la aferon, la skribanto faradis ĉion, kion li

povis, kaj kun gajaj paroloj en la buŝo daŭrigadis sian laboradon, kvankam li jam devis fari por tio ĉi ĉiam novajn kaj novajn ŝuldojn. Lia situacio fariĝis ĉiam pli kaj pli neelportebla: ĉar ne sole li ne povis revi pri la kovro de la faritaj ŝuldoj, sed al tio ĉi aliĝis ankoraŭ la jena cirkonstanco: okupata la tutan tagon je nia afero, en kiu li devas esti ĉio en unu persono, havante tial por io alia nek liberan kapon, nek sufiĉan tempon, li devis tute malŝati sian profesion, de kiu li devus vivi kaj nutri sian familion. Uzante la lastajn fortojn, mi tenis min tiel longe, kiel mi nur povis; sed al ĉiu ebleco estas timo, kaj nun la limo venis. Plu la afero tiel iri ne povas, ĉar venis le tempo de absoluta neebleco.

Oni devas sekve krei rimedojn por la eldonado de la gazeto kaj ankaŭ trovi ian bonan, kompetentan kaj fideblan, sed ankaŭ libertempan kaj finance senzorgan, kondukanton por nia afero, ĉar mia situacio atingis la lastan gradon de neebleco kaj ĉe la nunaj kondiĉoj la kondukado de nia afero estas por mi neebla, malgraŭ mia tuta volo. Sed ĉar ne tiel baldaŭ ankoraŭ troviĝos persono, kiu volus kaj povus min anstataŭi en la diversaj multaj laboroj por nia afero, tial estas necese, ke ĝis la troviĝo de tia persono mi daŭrigu mem la kondukadon de nia afero. Sed tion ĉi mi nun povus fari nur tiam, se oni povus difini por mi certan salajron kaj per tia maniero doni al mi la eblon ekzisti kaj labori, tiom pli, ke nun, kiel oni malsupre vidos, ekster ĉiuj ĝisnunaj laboroj komenciĝos ankoraŭ la eldonado de multaj verkoj (ne malpli ol unu folio ĉiusemajne), kaj por mia okupado je mia propra profesio ne restos jam eĉ unu libera minuto.

Difininte jam certan sumon por la subtenado de la afero, ni devas ankau memori pri ĝia progresigado kaj ni devas difini certan, kvankam eĉ ne grandan sumon por la senhalta propagandado kaj certan sumon por la senĉesa eldonado de ĉiam novaj verkoj.

Sekve por ke nia afero ne sole regule daŭrigu sian vivon kaj traatendu la malfacilan tempon de la indiferenteco de la mondo, sed ankaŭ senhalte progresadu, estas necese, ke ni per komunaj fortoj kreu por ĝi ian fonton, kiu ĉiujare donus al ĝi:

| | |
|---|---|
| a) Por eldonado de la „Esperantisto“ (kiu en tia okazo, ne bezonante jam enspezojn de la abonantoj, povus esti donata al la membroj de nia fondota societo senpage kaj la enspezojn de ĉiuj flankaj abonantoj enporti en la kason de la societo) . . . . . . . . . . . . . | 500 r. |
| b) Por la kondukanto de nia gazeto kaj afero, por ke li havu la eblon sin teni, ĝis troviĝos alia fidebla kondukanto senpaga . . . . . | 2000 r. |
| c) Por la senhalta daŭrigo de la propagando kaj varbado de ĉiam novaj amikoj kaj societanoj | 500 r. |
| ĉ) Por la senhalta eldonado de ĉiam novaj verkoj (ne malpli ol unu presita folio ĉiusemajne) kaj poŝta dissendado de ĉiuj ekzempleroj al la membroj de la societo*) . . . . . . . . | 2000 r. |
| Kune | 5000 r. |

Detala kalkulo de la tuta elspezata mono estos ĉiujare donata en la „Esperantisto“.

Kun la tempo ni sendube havos senkompare pli multe, ol 5000 rublojn ĉiujare, kaj ju pli da mono ni havos, des pli rapide kaj bone iros kompreneble nia afero. La dirita sumo estas tre malgranda kaj facile kreebla. Multaj institucioj, kiuj ne alportas eĉ milan parton de la utilo, kiun ni atendas de nia afero, englutas ĉiujare mil fojojn pli multe, ol tiu ĉi sumo. Sed tiu ĉi sumo estas la minimo, kiun ni bezonas. Se tiu ĉi sumo estos al ni por ĉiu jaro certigita, ni povos jam esti tute trankvilaj pro la estonteco de nia afero.

Kiel krei konstantan fonton, kiu donus al ni ĉiujare ne malpli ol 5000 rublojn? La plej bona rimedo kompreneble estus, se iu el la riĉuloj, kiuj interesas sin je ĉiuhomaj aferoj, volus oferi unufoje 100000 rublojn kaj tiel krei eternan fondon, kies procentoj estus tute sufiĉaj por je eterne certigi la regulan progresadon de nia afero. Sed pri io simila ni nun ne povas ankoraŭ eĉ revi, ĉar la grandaj riĉuloj staras ankoraŭ tute flanke de nia afero. Per si mem la sumo ne estas tre granda; vidante, kiel ofte la riĉuloj oferas sumojn dek kaj cent fojojn pli grandajn por celoj publikaj malpli gravaj kaj malpli facile atingeblaj, ol la nia, ni povas tute kuraĝe esperi, ke ankaŭ por nia afero pli aŭ malpli frue troviĝos grandaj oferantoj; sed nun la tempo de grandaj oferoj ankoraŭ ne venis por nia afero; ne sole unu granda riĉulo ne donos ankoraŭ la necesan sumon, sed eĉ kelkaj riĉuloj kune ĝin ne kreos. En konstanta laborado ni pacience atendos, ĝis la tempo de la grandaj oferoj venos kaj ĝis tia eterna fondo, per unu fojo aŭ iom post iom, estos kreita; sed ĝis tiu tempo estas eble ankoraŭ tro longe (kvankam ĝi povas kompreneble ankaŭ veni al ni de ia flanko tute neatendite tre baldaŭ); sekve ni dume devas certigi al ni la ĉiujaran sumon de 5000 rubloj per niaj propraj malgrandaj, sed kunigitaj fortoj.

Kvankam inter niaj amikoj ne trovas sin ankoraŭ grandaj riĉuloj, tamen alporti per fortoj kunigitaj la sumon de 5000 rubloj ĉiujare al ĉiuj Esperantistoj kune jam estus afero facila . . . se efektive ĉiu el ni volus fari, kiom li povas. Sed la sperto faris nin pesimistaj, kaj ni tute ne esperas, ke en la nuna tempo eĉ tiu ĉi malgranda sumo povu esti ĉiujare kolektita per memvolaj oferoj de niaj amikoj (La abonado de la „Esperantisto“ estas certe ne granda ofero, kaj tamen 9/10 el niaj amikoj estas tiel „ekonomiaj“, ke ili anstataŭ mem aboni, legas la ekzempleron de ia konato aŭ tute nian gazeton ne legas). Tiel anstataŭ kalkuli je ricevotaj oferoj, ni volas fondi el niaj amikoj akcian societon, al kiu apartenos la tuta financa flanko de nia afero, tiel ke proporcie je la enportitaj sumoj, la membroj dividados inter si ankaŭ la tutan estontan materialan profiton de nia afero. Akcianojn ni pli facile trovos, ol oferantojn, tiom pli, ke ni transdonas al ili aferon jam pretan, en kiu ĉiuj grandaj elspezoj fondaj kaj preparaj, ĉiuj riskoj kaj grandaj perdoj necesaj en la komenco de ĉiu entrepreno, estas jam faritaj ne el ilia poŝo. Por ke en la afero povu partopreni ne sole homoj bonhavaj kun sumoj grandaj (ju pli granda la enportita sumo, des pli granda kompreneble estos la ricevota profito), sed ankaŭ la plej malriĉaj el niaj amikoj, ni ellasas la akciojn en la sekvanta maniero:

a) La pago por la akcioj ne estos unufoja, sed konsistos en pagoj ĉiujaraj;

b) La ĉiujara pago por ĉiu akcio estos tre malgranda, nome: dek rubloj ĉiujare.

Sed nun naskiĝas la sekvantaj demandoj:

1) Kiel garantii al la akcianoj, ke ilia mono estos bone kaj honeste administrata kaj ne estos perdata? (Ĉar la estontaj membroj loĝas en diversaj urboj kaj landoj, sub malegalaj leĝoj, kaj nia societo ne tiel baldaŭ ankoraŭ povos fariĝi oficiala, tiu ĉi demando estas tre grava).

2) Kian garantion havos nia afero, ke la ĉiujaraj pagoj estos konstantaj, por ĉiam tute certigitaj kaj regulaj? (Tio ĉi estas la plej grava demando, ĉar supre ni jam montris, ke la plej grava celo por ni estas krei fonton konstantan, neniam sekiĝantan).

3) Poste, kiam la afero sufiĉe disvolviĝos kaj ne sole facile trovos amasojn da amikoj en la nomo de la afero mem, sed ankaŭ la materiala profito por la akcianoj estos granda

*) Kaj ankaŭ konstante al 100—200 plej gravaj redakcioj de gazetoj, por ke la mondo ĉiam ripete aŭdadu pri la progresado de nia afero.

kaj senduba, — tiam akcianoj troviĝos en amaso; sed kiel kolekti la plej rapide la unuan milon da akcianoj en la unua jaro, kiam la afero ne estas ankoraŭ tre profita?

La unuan demandon nia societo solvos en la sekvanta maniero: ekster la firme difinitaj kostoj de la kondukado kaj disvastigado de la afero, la tuta cetera envenanta mono estos ĉiam uzata por eldonado de ĉiam novaj verkoj (aŭ eble ankaŭ gazetoj), kaj ĉiuj ekzempleroj de ĉiuj verkoj kaj gazetoj eldonotaj de la societo estos ĉiufoje tuj senpage dissendataj al la societanoj proporcie je la nombro de la akcioj, kiujn ĉiu el ili havas (la nombro de la presotaj ekzempleroj de ĉiu verko estos ĉiam egala al la nombro de la akcioj, kaj unu akcio ricevados po unu ekzemplero de ĉiu verko). Sekve la kapitalo de nia societo sin ĉiam trovos en la manoj de la akcianoj mem, kiuj povos la verkojn konservi por si (tiam ili gajnos tion, ke la verkoj al ili kostos pli malkare, ol al aliaj personoj), aŭ vendi ilin kun profito laŭ certa venda kosto, kiu estos difinita por ĉiu verko por la personoj starantaj ekster nia societo. Ili povos ankaŭ (kun granda profito, kiel ni malsupre montros) vendi la akciojn mem, ĉar la akcioj ne estos nomaj kaj devos nur al la komenco de ĉiu jaro sciigi la kondukanton de la societo la adreson, sub kiu ili sin trovas, por ke tiu sciu, al kiu sendadi la verkojn.

La duan demandon la societo solvos per la sekvanta rimedo. Ĉar nia societo bezonas ĉiujare nur certan supre difinitan sumon da mono, tial por ni estas grave, ke nur certa nombro da akcioj estu konstante kaj regule pagataj. Ĉu ĉiuj ceteraj akcioj sin tenos konstante aŭ defluados kaj alfluados — tio ĉi jam ne estas por ni grava, kaj ni povas ĝin lasi al la bontrovo de la akcianoj mem. Por tute certigi al ni la regulan envenadon de 5000 rubloj ĉiujare, la societo agas en la sekvanta maniero. Ĉiu akcio portas konstantan numeron, kiu montras la ordon, en kiuj la akcioj estis aĉetitaj; la akcioj, portantaj numeron de 1 ĝis 1000 estas „akcioj fondintaj" kaj ne sole tuj en la komenco pagas nur 5 rublojn anstataŭ 10, sed ricevas por eterne la tre gravan privilegion, ke ili, havante tiujn samajn rajtojn, kiel la akcioj ordinaraj, devas ĉiam pagadi nur 5 rublojn ĉiujare anstataŭ 10. Sed tiun ĉi grandan privilegion la diritaj „akcioj fondintaj" konservas nur tiel longe, kiel ili akurate alportas sian ĉiujaran pagon; se en unu jaro tia privilegia akcio ne pagis ĝis la 1a de Februaro, ĝi perdas por eterne sian privilegion. Ĉe tia ordo ni povas esti tute certaj, ke almenaŭ 1000 akcioj ĉiam estos pagataj tre akurate (se iliaj posedantoj ne povos aŭ ne volos pagi por ili, ili jam mem penos vendi ilin al aliaj personoj, kiuj jam de sia flanko zorgados pri akurata pagado): ĉar neniu volos perdi la privilegion, kiun li unu fojon ricevis kaj neniam pli jam povos ricevi. La propra intereso estas la plej bona memoriganto kaj garantiulo.

La solvo de la tria demando jam per si mem estas enhavata en la solvo de la demando dua. Dank' al la supre dirita konstruo de nia societo, la aĉeto de akcioj ĝis No 1000 donas tian grandan profiton kaj tian grandan garantion, kiujn donas nenia alia pure komerca entrepreno. La grandega profito sendube al ĉiu falas en la okulojn, tamen ni ĝin ankoraŭ klarigos iom pli detale. Kiel oni malsupre vidos, ni por la komenco kolektos ankoraŭ ne la monon por la akcioj, sed nur la subskribojn (kaj por garantio ankaŭ 20% de la subskribita sumo), kaj nia societo estos fondita nur tiam, kiam la nombro de la akcioj subskribitaj (sed ankoraŭ ne pagitaj) atingos 1000. Nur tiam ni sciigos, ke la societo estas fondita, kaj ni petos alsendi al ni la monon kaj ricevi la akciojn. Tiel longe kiam la nombro de la akcioj ne atingos 1000, la akcianoj ne bezonas pagi eĉ unu kopekon (ekster la 20%, kiujn ili sendas kiel garantio, kaj kiun ili ricevos returne, se la societo ĝis Marto ne fondiĝos); ili ne komencos la enmetadon de sia mono, antaŭ ol iliaj kunigitaj rimedoj estos sufiĉe fortaj, por doni la garantion de senperda kaj profita irado de la afero. Sekve en tiu sama minuto, kiam Vi pagos por Via akcio la unuajn 5 rublojn, Vi jam scios, ke ne sole la societo estas jam sufiĉe forta por prospere agadi, sed — kio estas la plej grava — ke la nombro de la privilegiaj akcioj (la unua milo) jam de la unua minuto estas fermita kaj sekve jam de la unua minuto ĉiu nova amiko, kiu volas aĉeti akcion, devos pagadi por ĝi ne 5, sed 10 rublojn ĉiujare, kaj tial ĉiu el ili plivolos aĉeti la akcion de Vi kaj volonte pagos al Vi kvin aŭ dek fojojn pli multe ol Vi mem pagis, por ke li nur havu Vian numeron kaj gajnu per tia maniero la duonon de sia pago ĉiujare. Tiel jam en la minuto, kiam Vi Vian akcion aĉetos, ĝia indo saltos alte, altege.

Prezentante por la aĉetanto tian grandegan profiton, la unuatempaj akcioj en tiu sama tempo havas en si absolute nenian riskon. Ĉar neniu ja supozos, ke kun la minuto, kiam nia afero ricevos firman fundamenton, la nombro de ĝiaj amikoj ĉesos grandiĝadi kaj troviĝos pli nenia nova amiko, sekve nenia aĉetanto por la akcioj! Se nia afero ĝis nun ĉiam ricevadis novajn amikojn, kvankam pro nia manko de rimedoj ĝi estis tre malmulte konata en la mondo, — neniu ja dubos, ke nun, kiam ni ricevas rimedojn labori energie, ĝi trovos baldaŭ tre multajn novajn amikojn, kaj en la plej malfeliĉa okazo ĝi ja trovos baldaŭ en la tuta mondo almenaŭ 1000 amikojn por aĉeti la akciojn. Se Vi eble timas, ke, riskinte aĉeti grandan nombron da akcioj, Vi poste ne povos ilin vendi nur tial, ke Vi eble loĝas inter homoj indiferentaj kaj la nove aliĝantaj amikoj estos malproksime de Vi kaj Vi ne povos proponi al ili Viajn akciojn, — tiam ne forgesu ja, ke Vi tute ne bezonas persone serĉi aĉetantojn, sed Vi povas donadi pri Viaj vendotaj akcioj anoncojn en la „Esperantisto", kiun ĉiu nove aliĝonta amiko sendube legos, aŭ uzi aliajn rimedojn. Por tion ĉi faciligi, la „Esperantisto" anoncojn pri vendataj privilegiaj akcioj presados ĉiam senpage, en aparta rubriko.

Oni vidas sekve, ke la unua milo da akcioj ricevas grandajn privilegiojn kaj ĉiujn eblajn garantiojn. La granda profito kaj certeco, kiun havos la posedantoj de la akcioj privilegiaj, venas de tio, ke ekster la fruktoj, kiujn ilia kapitalo mem kurante al ili alportos, ili ricevas ankoraŭ senpage la pretajn fruktojn de granda kapitalo jam antaŭ ili enmetita en la aferon kaj la certigon de fruktoj de kapitalo, kiu post ili de diversaj personoj estos enmetita en la aferon. Se ni donas al tiuj ĉi akcioj fondantaj tiajn eksterordinare grandajn privilegiojn, ni faras ĝin tial, ke la tempo estas al ni tre kara kaj ni oferas ĉion, kion ni povas, por nur kiel eble plej rapide altiri la necesan kapitalon, kiel eble plej rapide disvendi la unuan milon da akcioj, por ke nia societo povu komenci sian funkciadon.

En vido de la grandega profito, kiun prezentas la akcioj de la unua milo (ne parolante jam pri la morala signifo de tiuj ĉi akcioj, kiuj kreos la firman fundamenton por grava ĉiuhoma afero), ni povas esperi, ke ĉiu rapidos subskribiĝi je kiel eble pli granda nombro da akcioj kaj kiel eble pli rapide, por ke li trafu ankoraŭ antaŭ ol la unua milo estos fermita. Ni petas, ke oni alsendu la subskribojn kiel eble plej baldaŭ, ĉar kiam la unua milo estos subskribita, tiam ni ne povos jam vendi privilegiajn akciojn eĉ al la plej varmaj kaj meritaj amikoj. Por subskribiĝi, estas sufiĉe sendi al la skribanto de tio ĉi la sekvantan leteron:

„Mi deziras havi . . . . . *) privilegiajn akciojn de
„la „Akcia Societo Esperantista". Kun tiu ĉi letero
„mi sendas 20% de la kosto de la dirita nombro
„da akcioj kaj la ceteran 80% mi sendos, kiam Vi sciigos
„min, ke 1000 akcioj estas jam subskribitaj kaj ke la So-
„cieto estas fondita. Se ĝis la 1a de Marto 1892 la So-

„ĉieto ne estos ankoraŭ fondita, tiam mi petas sendi al mi „returne la nun sendatan monon aŭ uzi ĝin en la maniero, „kian mi tiam skribos al Vi.“

(Subskribo)

„Mia adreso por la jaro 1892 estas:

Pli aŭ malpli frue ni penos, ke nia Societo estu forme sankciita de la registaroj; sed ĉar en la unua tempo tio ĉi estos iom malfacila, postulus tro multe da tempo kaj estus ligita kun tro grandaj maloportunaĵoj, tial en la unua tempo nia Societo ekstere havos karakteron personan, t. e. la tutan oficialan respondecon prenas sur sin la skribanto de tiu ĉi artikolo. La akcioj, kiujn la membroj ricevos, havos plimalpli la sekvantan formon:

I. Formo de la akcioj privilegiaj:

„No

„De la posedanto de tiu ĉi karto mi ricevis 5 rub„lojn, kaj mi prenas sur min la ŝuldon alsendadi al li sen„page po unu ekzemplero de ĉiuj verkoj aŭ gazetoj en aŭ „pri la lingvo Esperanto, kiujn mi eldonos en la daŭro de „la tuta jaro 1892 (tute egale, ĉi ili estos verkitaj de mi „aŭ de aliaj personoj). Ekster tio mi ŝuldas sendadi al la „posedanto ankaŭ en ĉiuj venontaj jaroj ĉiam por la egala „pago de 5 rubloj ĉiujare po unu ekzemplero de ĉiuj el„donotaj de mi verkoj aŭ gazetoj, kiel ajn granda ilia „nombro estos, se li nur sendados al mi ĉiujare la 5 rub„lojn ne pli malfrue ol ĝis la 1a de Februaro de ĉiu jaro. „Se en ia jaro mi ne ricevos de la posedanto la diritan „pagon ĝis la 1a de Februaro, tiam mia ŝuldo rilate la pose„danton finiĝas.“ L. Zamenhof.

---

II. Formo de la akcioj simplaj:

„No

„De la posedanto de tiu ĉi karto mi ricevis 10 rub„lojn, kaj mi prenas sur min la ŝuldon elsendadi al li „senpage po unu ekzemplero de ĉiuj verkoj aŭ gazetoj en „aŭ pri la lingvo Esperanto, kiujn mi eldonos en la daŭro „de la tuta jaro 18 . . (tute egale ĉu ili estos verkitaj „de mi aŭ de aliaj personoj).“ L. Zamenhof.

---

Tiel oni vidas, ke ĝis la tempo, kiam nia Societo ricevos forman sankcion de la registaroj, en la akcioj estos nenio dirita pri la Societo; sed ĉio, kion mi diris en la nuna artikolo, estos ŝuldiga por mi antaŭ la leĝoj; mia nuna artikolo estas oficiala ŝuldiĝo de mia flanko.

Se la Societo poste iam trovos, ke mi kondukas la aferon ne bone, ĝi havas la rajton elekti per voĉdonado alian kondukanton (en la aferoj de la Societo ĉiu membro havas tiom da voĉoj, kiom da jare pagitaj akcioj li havas). Sed tiel longe, kiel mi estas kondukanto, mi prenas al mi la rajton kondukadi la aferon laŭ mia propra bontrovo, kaj al la akcianoj mi devas nur donadi ĉiujare (en la „Esperantisto“) kalkulon de ĉiuj enspezoj kaj elspezoj, kiujn la Societo havis. Mi mem ne havas la ŝuldon sur ĉiu paŝo konsiliĝadi kun la akcianoj; sed se per la iniciativo de iu el la membroj la Societo per plejmulto da voĉoj ion decidos, tiam tiu ĉi decido estas por mi leĝdonanta.

---

*) Skribi la nombron de la dezirataj akcioj.

Ĉion, kion mi diris, mi nun resumas en formo de reguláreto de la „Akcia Societo Esperantista“:*)

§ 1. La „Akcia Societo Esperantista“ havas la celon zorgi pri la regula kaj konstanta disvastigado de la lingvo Esperanto kaj grandigado de ĝia literaturo.

§ 2. La tuta havo de la Societo apartenas al la membroj de la Societo proporcie je la nombro de la akcioj, kiujn ĉiu el ili posedas.

§ 3. Kiu volas partopreni en la Societo, aĉetas akciojn de la Societo, el kiuj ĉiu aparta kostas 10 rublojn por jaro kaj donas al la posedanto unu voĉon en la aferoj kaj unu parton en la havo de la Societo.

Rimarko. La pagoj estas renovigataj en Januaro de ĉiu jaro, kaj ĉiun jaron la membroj ricevas por siaj pagoj novajn akciojn (sub ĉiam tiu sama numero, se la pagado ne estis interrompita). La akcioj ne estas nomaj, kaj sekve ilia transirado de unu posedanto al alia ne ŝanĝas ilian indon.

§ 4. Ekster la kostoj de la kondukado kaj disvastigado de la afero de la lingvo Esperanto (la alteco de tiuj ĉi kostoj estas en la komenco de ĉiu jaro difinataj per voĉdonado de la akcianoj), la tuta cetera kapitalo de la Societo estas uzata por eldoni en aŭ pri la lingvo Esperanto ĉiam novajn verkojn, kiuj estas presataj ĉiam en tiom ekzempleroj, kiom akcioj ekzistas, kaj senpage dissendataj al la akcianoj proporcie je la nombro de la akcioj, kiujn ĉiu el ili posedas.

Rimarko. La aŭtoroj de la eldonotaj verkoj ricevas nenian pagon por sia laboro, kaj estas la ŝuldo de la kondukanto de la Societo ĉiam zorgi pri la ekzistado de sufiĉa nombro da bonaj manuskriptoj, aŭ en okazo de manko prepari ilin mem; sed dum la Societo havas la rajton presi de ĉiu verko nur tiom da ekzempleroj, kiom akcioj ekzistas, la aŭtoro de ĉiu eldonata verko havas la rajton postuli, ke la Societo presu de lia verko pli grandan nombron da ekzempleroj kaj tiam li pagas la tutan superfluan monon kaj ricevas kil sia propraĵo ĉiujn superfluajn ekzemplerojn. Se poste estos utile per pagoj aŭ per konkursaj premioj helpi la naskiĝon de bona literaturo originala, la kondukanto povas tion ĉi fari nur post ricevo de speciala permeso de la flanko de la akcianaro.

§ 5. Ĝis la tempo, kiam la Societo trovos necese elekti alian kondukanton, la kondukado de la aferoj de la Societo sin trovas en la manoj de L. Zamenhof, kiu en ĉiuj aferoj, por kiu li ne ricevis difinitan ordonon (per voĉdonado) de la Societo, povas sin gvidi je sia propra bontrovo. Sed en la fino de ĉiu jaro li devas doni al la akcianoj detalan kalkulon de ĉiuj enspezoj kaj elspezoj, kiun li havis en la jaro.

§ 6. La Societo kompreneble disponas nur super la uzado de la kapitaloj de la Societo mem; ĉio alia, tuŝanta la lingvon Esperanto ekster la Societo, restas, kiel antaŭe, propraĵo de la tuta mondo; oferoj flankaj, farataj por la afero Esperanto, estas uzataj laŭ la dispono de la oferantoj mem.

§ 7. La fondiĝo de la Societo fariĝas en la sekvanta maniero: Ĉiu, kiu volas havi parton en la Societo, sciigas la kondukanton pri la nombro de la akcioj, kiujn li volas aĉeti por la unua jaro, kaj sendas 20 % de la kostoj de la subskribitaj de li akcioj. La Societo fondiĝas ne pli frue, ol kiam 1000 akcioj estos subskribitaj; tiam la kondukanto sciigas la subskribintojn, ke la Societo estas fondita, la subskribintoj alsendas la restajn 80 % kaj ricevas la akciojn, kaj la Societo komencas sian funkciadon. Se ĝis la 1a de Marto 1892 la Societo ne estos fondita, tiam la subskribintoj ricevas returne siajn senditajn 20 %. — Por ke la Societo

*) En pli orda kaj detala formo ni presos la regularon, kiam la Societo estos fondita; nun ni nur ripetas, ke ĉio, kion ni diris en nia artikolo, estas ŝuldiga por ni, se ĝi eĉ eble en la nuna resumo sin ne trovas, aŭ estas ne klare esprimita.

fondiĝu kiel eble plej rapide, en la unua tempo estas ellasataj 1000 akcioj „fondantaj", kiuj, havante tiujn samajn rajtojn, kiel la akcioj ordinaraj, donas tamen al siaj posedantoj (sennomaj) la eternan privilegion pagadi ĉiujare nur 5 rublojn anstataŭ 10 rubloj. Sed se en unu jaro la posedanto de tia privilegia akcio ĝis la 1a de Februaro ne pagis por ĝi la jaran pagon, la akcio perdas sian privilegion kaj fariĝas por ĉiam akcio ordinara. En la vendado de la privilegiaj akcioj la Societo gvidas sin per neniaj personaj meritoj, sed nur per antaŭeco de la subskriboj; kaj kiam la nombro de la subskribitaj akcioj atingos 1000, tiam la vendado de akcioj privilegiaj estos ĉesigita.

---

Ni klarigis la tutan konstruon de nia Societo kaj nun ni petas, ke ĉiu, al kiu nia afero estas kara, rapidu subskribi kiel eble pli grandan nombron da akcioj. Ĉar ekster la morala indo niaj akcioj havas ankaŭ gravan indon pure komercan, tial niaj amikoj povas facile varbi akcianojn eĉ inter personoj, kiuj por nia afero mem estas tute indiferentaj. Laŭ la mezuro de la vendado de la akcioj ni presados en la „Esperantisto" la nomojn de la akcianoj; sed personoj, kiuj volas partopreni en nia afero nur komerce aŭ pro ia kaŭzo nekonate, povas postuli, ke iliaj akcioj estu publikigataj sub ia signo anstataŭ sub ilia nomo.

Ni turnas la atenton de la personoj, kiuj havas aŭ povas havi kelkan liberan kapitalon, ke, aĉetante kiel eble pli grandan nombron de niaj akcioj, ili helpos meti firman fundamenton al nia kara afero, por eterne certigos ĝian regulan progresadon, kaj tamen ili per tio ĉi sian kapitalon ne oferos, sed nur pruntos sub kondiĉoj tre oportunaj por ili.

---

Prezentante nun nian projekton al niaj legantoj, ni petas ĉiun el ili kiel eble plej baldaŭ sendi al ni respondojn je la sekvantaj demandoj:

1) Ĉu li aprobas la projekton aŭ ĉu li trovas en ĝi iajn gravajn erarojn;

2) ĉu li povas al ni proponi ian alian, pli bonan projekton, aŭ plibonigojn al nia nuna projekto;

3) ĉu en okazo, se nia projekto restus en ĝia nuna formo, li volos aĉeti akciojn, kaj kian nombron;

4) se li proponas alian projekton, tiam kun kia kapitalo li volus kaj povus eniri en la aferon, se estus akceptita lia projekto.

Se post la ricevo de la respondoj de niaj amikoj montriĝos, ke nia projekto povas pli-malpli esperi esti efektivigita, tiam ni post unu monato komencos akceptadi la subskribojn je la unuatempaj akcioj.

---

Se post la ricevo de la respondoj de niaj amikoj montriĝos, ke nia projekto ne povas esperi ricevi sufiĉan nombron da subskriboj, tiam ni presos ankoraŭ kelkajn aliajn projektojn de ni kaj de aliaj amikoj de nia afero, kaj la projekto, kiu ricevos la plej grandan nombron da promesitaj subskriboj, estos akceptita. Tial ni kun la akceptado de la subskriboj kaj de la 20% atendas ankoraŭ, ĝis la afero klariĝos, kaj en la unua monato ni petas la amikojn nur skribi al ni, kiom da akcioj ĉiu el ili volos subskribi. Sed la tempo estas kara, kaj ni esperas, ke tiun ĉi fojon niaj amikoj ne lasos nin longe atendi ilian respondon kaj ne devigos nin kelkajn fojojn ripeti nian peton.

---

En la tempo de la presado unu amiko faris al nia projekto kelkajn demandojn, kiuj montras, ke ni eble ne tute klare esprimis niajn pensojn. Timante, ke tiun ĉi saman demandon eble volos fari ankaŭ aliaj, ni presas tie ĉi la respondon, kiun ni donis al nia amiko.

**Demandoj**: 1) se unu persono aĉetos ekzemple 200 akciojn privilegiajn kaj longe ne trovos aĉetantojn por siaj akcioj, li tiam sekve ricevados por si mem po 200 ekzempleroj de ĉiu eldonota verko — kion li faros kun tia granda nombro da verkoj, kiuj ne havos por li indon kaj kiujn li, kiel privata persono, neniam povos vendi? 2) se ĉiuj presitaj ekzempleroj de ĉiu verko estos dissenditaj al la Societanoj — kion faros la personoj, starantaj ekster la Societo kaj volantaj aĉeti tiun aŭ alian verkon? — **Respondo**: ĉiuj ekzempleroj estos dissendataj al la akcianoj nur „por ke la tuta kapitalo de la Societo sin ĉiam trovu en la manoj de la Societanoj mem"; sed la societanoj tute ne bezonas sin mem okupadi je la vendado de la libroj (ekster la okazo, se ili mem ĝin volas fari, esperante vendi siajn librojn pli profite); ili povas fari tion saman, kion faras ĉiuj aŭtoroj de verkoj, t. e. doni siajn librojn al libristoj (aŭ al la skribanto de tiu ĉi artikolo), kaj laŭ mezuro de la vendado de la libroj ili ricevos la monon por ili. La plej bone estos krei ian ĉefan centran vendejon, kiu sin okupados je la vendado de la akcioj kaj ankaŭ de ĉiuj verkoj. La programon de tia „centra vendejo" ellaboros jam poste la akcianoj mem; ĝis tiu tempo ni volonte prenos sur nin mem la rolon de tia centra vendejo.

Se ĉiu aparta aŭtoro, eldonante sian verkon ekzemple en 1000 ekzempleroj, havas la rajton esperi, ke pli aŭ malpli frue ĉiuj liaj ekzempleroj estos venditaj kaj alportos al li gajnon, kvankam li persone ilin ne disvendas, sekve ankaŭ niaj societanoj havas tian saman rajton tion ĉi esperi, tiom pli, ke per sia komuna societa kapitalo ili havos multe pli grandan eblon elvoki vendadon multe pli energian. Nia Societo estos simpla akcianaro eldonanta; kaj kiel en ĉiu akcianaro tute ne estas necese, ke la akcianoj mem sin okupadu je la vendado de la produktoj de sia firmo, tiel ankaŭ komprenebla en la nia.

Supozante, ke en nia projekto eble povas troviĝi ankaŭ multaj aliaj malklaraĵoj, kiuj detenus niajn amikojn, ni devas fari tie ĉi la sekvantan komunan rimarkon: diversaj detaloj en nia projekto, kiuj eble al tiu aŭ alia amiko ŝajnos eraraj, tute ne devas lin deteni de nia projekto, ĉar ĉiujn detalojn la societanoj povos poste (per voĉdonado) ellabori aŭ ŝanĝi laŭ sia propra bontrovo. L. Zamenhof.

---

## Korespondoj.

Freiburg (Badenujo), la 15. VIII. 91.

Al sinjoro Chr. Schmidt, kondukanto de la Esperantistoj en Nurnberg'.

Estimata Sinjoro!

La subskribitoj havas la honoron peti Vin publikigi per la gazeto „La Esperantisto", ke, la 25. V. 91 vespere, ili fondis klubon, kiu intencas helpi vastigi la lingvon internacian „Esperanto".

La societanoj alprenis la nomon „Klubo Esperantista en Freiburg (Badenujo)".

Malgraŭ ke ĝis tiam la lingvo Esperanto estis tute nekonata en nia urbo, ni trovis — dank' al fervora laboro — jam multajn amikojn, kiuj havas intereson, parte varmegan intereson por nia afero, kaj ni ĝojas, ke ni povas sciigi Vin, ke la nombro de niaj klubanoj estas nun ĉirkaŭ 40.

Tiu ĉi sukceso estis atingita ne malprecipe per tio, ke ni, jam baldaŭ post la fariĝo de la klubo, ricevis poŝtajn kartojn kaj leterojn el malproksimaj landoj kaj ke ni montris ilin al tiuj personoj, kiuj jam estis varbataj kaj al tiuj, kiujn

ni ankoraŭ volis varbi al kunlaboro. Ĉiam oni miris, ke ni povis kompreni leterojn verkitajn internacie, eĉ sen vortaro, kaj ne koninte la lingvon nacian de la verkintoj. Oni miris pro la ĝentileco kaj amindeco de la eksterlandanoj skribintaj al ni. Oni komencis vidi, ke estas granda afero: havi lingvon, per kiu ĉiuj homoj povas kompreniĝi, kaj tiuj, kiuj antaŭe ridis pri la elpenso kaj la propono de lingvo tutmonda, jam pri ĝi ne ridas.

Nature ne ĉiuj niaj klubanoj povas aŭ volas korespondi en Esperanto. Sed ni scias, ke ĉiuj estas pretaj helpi al nia afero en ia ebla maniero.

Tial ni povas esperi, ke ankaŭ nia klubo alportos utilon por atingi la celon de ĉiuj bonepensantoj, t. e. akceli la vastigadon de la komerco kaj de la scienco, unuigi la homaron al komuna laboro, fari pacon sur la tero.

Kun saluto internacia ni estas la prezidantaro de la „Klubo Esperantista en Freiburg (Badenujo)".

Adolf Rardt
Eckertstrasse No. 12.
(komencente de Augusto)

A. Mayer
Moltkestrasse 21.

A. Dieter
Hugstetterstrasse 4.

Wöhler
Werderstrasse 9.

K. Spiegelhalter
Münsterplatz 19.

---

Uzitaj signoj de poŝto estis transenditaj al la Internacia Klubo de Korespondado por la propagando de diversaj amikoj de nia afero. La nomoj de ili estas:

S-ro Vasilo Kravcov en Bogučar,
„ A. S. en Kiew,
„ d-ro D. Marignoni en Crema,
„ Schmedberg, studento en Upsala,
„ d-ro Wöhler en Freiburg (Badenujo),
„ Rossauer, komercisto en Nurnberg,
„ Ulrich, instruisto „ „
„ Versen, redaktoro „ „
„ Übelein, komercisto „ „
„ Franz Schmidt, komercisto en Nurnberg,
„ Franz Dumpert, komercisto en Augsburg,
„ R. Teichmann, komercisto, Vietz,
„ Orr, komercisto en Chicago.

Koran dankon elparolas al ĉiuj bonecaj donantoj en la nomo de l' Internacia Klubo de Korespondado

Chr. Schmidt
Friedrich Ebersberger
Hans Wagner

---

## Novaĵoj.

La aŭtoro de la lingvo Esperanto ricevis de la Klubo Esperantista en Schalke donacon de 500 (kvincent) rubloj. La donaco estis akompanito de letero, en kiu la donacantoj diras, ke ili estas preta subteni nian aferon nur sub la kondiĉo, ke la aŭtoro akceptu la donacon difinitan por si persone.

* * *

Por la celoj de nia afero ni ricevis: de sinjoro A. Grabowski el Ivanovo-Voznesensk — 10 rublojn; de sinjoro N. Mitrofanov el Tzarskoje Selo — 1 rublon. — Kune 11 rubloj.

* * *

Lernoliarojn (ne malpli ol 10) en la lastaj 2 monatoj venigis: s-ro N. Mitrofanov el Tzarskoje Selo — $^{25}/_{41}+{}_{1}{}^{0}/_{1}+{}^{2}/_{43}$; s-ro R. Geoghegan el East-Sound — $^{15}/_{5}$; s-ro K. Hübert el Aleksandrovsk — $^{10}/_{41}+{}^{10}/_{42}$; s-ro A. Zinovjev el Poltava — $^{25}/_{41}+{}^{15}/_{43}$; s-ro A. Burnovski el Brest Litovsk — $^{25}/_{41}$; s-ro A. Zambjicki el Vilno — $^{25}/_{41}$.

* * *

En la lasta tempo la sekvantaj gazetoj parolis pri nia afero: „Odessaer Zeitung" No. 132 (Traduko [de s-ro Hübert] de la matematika regulo de s-ro Grohn el la No. 5 de la „Esperantisto"); „Kolyvanj" No. 129—343 (artikolo-korespondo de s-ro V. Maynov pri nia lingvo kaj nia afero); „Stereotypeur" No. 7 (daŭrigo de la artikolo de s-ro Schmidt pri nia lingvo, kun gramatiko kaj ekzercoj); „Russkij Listok" No. 156 (pri la traduko de la „Renaskita Manfred"); „Reform" No. 7 (pri nia lingvo kaj pri la lernolibro No. 43); „Vilenskij Vjestnik" No. 156 (artikolo de s-ro A. N—n pri nia lingvo, ĝia esenco, progresado kaj disvastiĝado). — Al sinjoroj Hübert, Maynov, Schmidt, Dombrovski, Portnov, Trompeter kaj Silbernik, kiuj sendis al ni la diritajn gazetojn, ni esprimas nian koran dankon.

* * *

La klubo „Espero" en S. Peterburgo skribas al ni, ke ĝi intencas eldoni tradukojn de la poŝa gramatiko en lingvoj sveda kaj finlanda, kaj petas nin, ke ni sciigu tion ĉi per la „Esperantisto", por ke aliaj personoj ne perdu senbezone tempon por tiuj ĉi samaj laboroj. Du membroj de la klubo, sinjoroj A. Florell kaj N. Halle, vizitis la klubon Volapükistan en S. Peterburgo kaj havis tie longan disputon kun la kondukantoj, kiuj (kiel ili jam kelkajn fojojn private lasis nin vidi) tute aprobas nian aferon kaj ellernis nian lingvon, kvankam publike ili ne volas ankoraŭ aliĝi al ni. La klubo „Espero" venigis ankaŭ kelkan nombron da diversaj verkoj en nia lingvo kaj donis ilin en komision al la S. Peterburga libristo M. V. Popov (Nevskij Prospekt, apud la Pasaĵo).

* * *

Eliris el la presejo kaj estas dissenditaj al la rusaj redakcioj de gazetoj la publika parolo de inĝeniero V. B. en la Muroma Muzika-drama Societo. Ĉar la aŭtoro nun ne loĝas pli en Murom, la personoj, dezirantaj havi tiun ĉi broŝureton, volu sin turni al L. Zamenhof.

* * *

Eliris el la presejo la verko „50 Elektitaj Fabloj de Ezopo. Esperantigis I. Lojko. Nurnbergo 1891". La verko estas bone kaj elegante eldonita, la stilo estas pura (la verko estis trarigardita de L. Zamenhof); nur kiel provo la aŭtoro tute ne uzis en sia verko la artikolon („la"), por konvinkiĝi, ĉu la uzado de la artikolo estas necesa aŭ ne. Per sia mallonga formo la fabloj povas esti tre bona rimedo por la ellernado de nia lingvo, kaj ni rekomendas ilin al niaj amikoj. La kosto de la verko estas 20 kopekoj.

* * *

Ripete rekomendante al la atento de niaj amikoj la tre gravan verkon No 43 (poŝa lernolibro por germanoj), ni povas ilin nun sciigi, ke ĉiuj ekzempleroj de tiu ĉi verko (eĉ en granda nombro) povas esti ricevataj rekte de L. Zamenhof.

* * *

Al la personoj, kiuj deziras havi la litovan lernolibron de nia lingvo (No 47), konsilas sin turni ne al ni, sed al la presisto de tiu ĉi libro (s-ro J. Schoenke en Tilsit).

# Anoncoj.

## Nomaro

### de l' verkoj pri la lingvo internacia Esperanto, kiuj eliris ĝis Aŭgusto 1891.

| № | Nomo de l' verko: | Kosto: |
|---|---|---|
| 1. | D-ro Esperanto. Mejdunarodni Jazik. Predislovie i Polni Učebnik. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono rusa) | 15 kopekoj |
| 2. | — Jezyk Miedzynarodowy. Przedmowa i Podrecznik Kompletny. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono pola) | 15 kop. |
| 3. | — Langue Internationale. Préface et Manuel Complet. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono franca) | 20 kop. |
| 4. | — Internationale Sprache. Vorrede und Vollständiges Lehrbuch (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono germana) | 20 kop. |
| 5. | R. Geoghegan. Dr. Esperanto's International Language. Introduction and Complete Grammar. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono angla) | 20 kop. |
| 6. | D-ro Esperanto. Malgranda vortaro de la lingvo Esperanto (kun antaŭparolo) por Rusoj | 3 kop. |
| 7. | — por Poloj | 3 kop. |
| 8. | — por Francoj | 3 kop. |
| 9. | — por Germanoj | 3 kop. |
| 10. | — por Angloj | 3 kop. |
| 11. | D-ro Esperanto. Dua Libro de l' Lingvo Internacia (verkita en la lingvo Esperanto) | 25 kop. |
| 12. | D-ro Esperanto. Aldono al la Dua Libro de l' Lingvo Internacia (en Esperanto) | 10 kop. |
| 13. | Hanez. Safah achath lekulanu (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea) | 20 kop. |
| 14. | A. Grabowski. La Neĝa Blovado. Rakonto de Puŝkin (en Esperanto) | 15 kop. |
| 15. | L. Einstein. La Lingvo Internacia als beste Lösung des internationalen Weltsprache-Problems. [illegible]wort, Grammatik und St[illegible] nebst Stamm[illegible] Verzeichniss nach dem Entwurf des [illegible] Dr. Esperanto | [illegible] kop. |
| [illegible] | N. N. Rusa traduko [illegible] „Dua Libro de l' Lingvo Internacia" | 25 kop. |
| 17. | D-ro Esperanto. Plena vortaro rusa-internacia | 1 rublo. |
| 18. | N. N. Rusa traduko de la „Aldono al la Dua Libro" | 10 kop. |
| 19. | A. Grabowski. La Gefratoj. Komedio de Göthe (en Esperanto) | 15 kop. |
| 20. | L. Einstein. Weltsprachliche Zeit- und Streitfragen. Volapük und Lingvo Internacia | 25 kop. |
| 21. | D-ro Esperanto. Meza vortaro internacia germana | 25 kop. |
| 22. | Henry Phillips, Jr. An Attempt towards an International Language by Dr. Esperanto translated by Henry Phillips Jr., a secretary of the American Philosophical Society. Together with an english-international vocabulary compiled by the translator | 50 kop. |
| 23. | Hanez. Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea-germana | 20 kop. |
| 24. | G. Henriclundquist. Dr. Esperanto's Internationelt Sprak (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono sveda) | 20 kop. |
| 25. | A. Demonget. Internacia ou Volapük? par Léopold Einstein, traduction de Auguste Demonget | 25 kop. |
| 26. | E. de Wahl. Vortaro Esperanto-hispana | 3 kop. |
| 27. | G. Henriclundquist. Vortaro Esperanto sveda | 3 kop. |
| 28. | Klubo Nurnberga. La Lingvo Internacia. Vollständiger Lehrgang der internationalen Sprache nebst Wörterbuch zum Gebrauche für Deutsche. Herausgegeben vom Nürnberger Weltsprache-Verein | 25 kop. |
| 29. | R. Libek. Starptautiska Waloda (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono latva) (Lettisch) | 60 kop. |
| 30. | E. de Wahl. Princino Mary. Rakonto de Lermontor (en Esperanto). Kajero No. 1 | 25 kop. |
| 31. | Adresaro de la Esperantistoj, kajero No. 1 | 10 kop. |
| 32. | Marietta Frollo. Vortareto Esperanto-rumana | 3 kop. |
| 33. | Chr. Nielsen. Laerebog til det internationale Esperantosprog. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono dana) | 25 kop. |
| 34. | M. S. Bogdanov. Pulen učebnik za svetski ut jezik. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bulgara) | 50 kop. |
| 35. | Dr. D. Marignoni. Esperanto ossia la piu pratica delle lingue internazionali. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono itala) | 25 kop. |
| 36. | J. Rodriguez Huertas. Gramática de la Lingvo Internacia del Doctor Esperanto. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hispana) | 20 kop. |
| 37. | A. Grabowski. Kondukanto internacia de l' interparolado kun modeloj de leteroj (en Esperanto) | 30 kop. |
| 38. | A. Zinovjev. Meždunarodni jazik „Esperanto" (la tuta eldono estis senpage dissendita) | |
| 39. | Fr. Vl. Lorenc. Úplná učebnice mezinarodni reĉi dra Esperanta (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bohema) | 25 kop. |
| 40. | D. Gurevič. Sefer hamilim Esperantis (Vortareto hebrea-esperanta) | 20 kop. |
| 41. | L. Zamenhof. Vsemirni jazik Esperanto. Polni učebnik s 2 slovarjami (Poŝa lernolibro de la lingvo Esperanto por Rusoj) | 10 kop. |
| 42. | Wörterbuch der internationalen Esperanto-Sprache. Deutsch-internationaler Teil. Meza vortaro germana-internacia | 25 kop. |
| 43. | Die Weltsprache Esperanto. Vollständiges Lehrbuch nebst 2. Wörterbüchern (Poŝa lernolibro de la lingvo Esperanto por Germanoj) | 10 kop. |
| 44. | A. Grabowski. La Nova [illegible] de Boleslaw Prus. Janko Muzikanto, de H. Sienkiewicz | 20 kop. |
| [illegible] | Ludwig Meier. La Lingvo Internacia Esperanto. Vollständige methodische Grammatik. Formenlehre und Syntax der internationalen Sprache Esperanto | [illegible] kop. |
| 46. | V. V. de Maynov. Renaskita Manfred, drama en tri aktoj, de K. R. | [illegible] |
| 47. | A. Dombrovski. Lingvo internacia de D-ro Esperanto, eldono litova. Mokintuve tarptautiszkos kalbos Dro Esperanto | 15 kop. |
| 48. | V. B. Parolo pri la lingvo Esperanto, havita en la Muroma Muzika-Drama Societo (en lingvo rusa) | 3 kop. |
| 49. | I. Lojko. 50 Elektitaj Fabloj de Ezopo (en Esperanto) | 20 kop. |


## Vladimir Vladimirovic de Maynov

senpage instruas la lingvon Esperanto per korespondado (oni devas pagi lian respondon). Lia adreso: Rusujo, S. Peterburgo, Počtamt, poste restante.

## Wörterbuch der internationalen Esperanto-Sprache.

Deutsch-international.

Meza vortaro germana internacia povas esti ricevata de la presejo de **W. Tümmel, Nürnberg.**

Kosto 50 pfenigoj.


Für die Redaktion verantwortlich: Chr. Schmidt, Nürnberg. — Druck von W. Tümmel's Buch- und Kunstdruckerei in Nürnberg.